

# Kelkaj rimarkoj pri la libro "Krimeo Estas Nia" de la ĵurnalisto Kalle KNIIVILÄ

de Andreo J. PENK

La libro "Krimeo Estas Nia" de la ĵurnalisto Kalle KNIIVILÄ bedaŭrinde plenumas mian antaŭtimon pro la subtitolo: "Reveno de la Imperio". La aŭtoro preferas - anstataŭ neŭtrale informi - propagandi laŭ la nun reganta lingvo-reguligo fare de Okcidento pri la Ukraino-konflikto. Kial?

Trafe informas KNIIVILÄ, ke "en la 1950-aj jaroj Krimeo estis aligita al la Ukraina Sovetia Respubliko" (p. 7), sed li forgesas skribi, ke tiu okazis pro ekonomiaj kialoj kaj sen demandi la loĝantaron. Tiu ŝanĝo estis arbitraĵo fare de la tiama ŝtatestro de Sovetunio.

Pri la rezulto de la okazaĵoj en 2014 la aŭtoro konsekvence uzas la terminon "anekso"; sed li prisilentas la fakton, ke ne ĉiuj fakuloj prijuĝas egale tiun.

Ekzemple, prof. d-ro Karl Albrecht SCHACHTSCHNEIDER, Berlino, opinias, ke la rajton je mem-determino de la civitanoj de Krimeo neniuj internacijura konvencio aŭ konstitucio povas neigi. Krimeo kiel aŭtonoma respubliko pravis kaj pravas iri propran vojon kaj apartigi sin disde Ukraino. Kaj - SCHACHTSCHNEIDER diras - la subteno fare de Ruslando pri la apartigado de Krimeo estis proporcie kaj ne ofendis internacian juron.

Mi respektas, ke KNIIVILÄ disvastigas la regantan, oficialan opinion, sed mi kritikis lian emon subpremi la fakton, ke tiu opinio ne estas sen-duba inter fakuloj.

Sur paĝo 8 li skribas: "La agado de Rusio aspektis neracia. Kial oni elektus ruinigi la tutan Eŭropan sistemon de sekureco kaj neglekti ĉiujn interkonsentojn pri la netuŝebla de ŝtataj limoj [...]" Mi demandas min, ĉu KNIIVILÄ iel forgesis reserĉi.

Denove SCHACHTSCHNEIDER: "NATO, gvidata de Usono, intencas plivastigi sin orienten ĝis la limo de Ruslando. [...] La ja ne laŭ-kontrakte certigita promeso ne plivastigi plie orienten NATO-n, la Okcidento ne plenumas. [...] Okcidento akcelis la renverson de la registaro en Ukraino, eble eĉ faris tiun. Estis gravaj ofendoj de la interna kaj ekstera suverenaj de Ukraino. [...] Ne la ŝtatoj estas suverenaj [...], sed la homoj kiel civitanoj." (Karl Albrecht Schachtschneider, Berlino, Aprilo 2014)

KNIIVILÄ evidente reprezentas la ŝtatjuran pozitivismon el la 19a jarcento: la pozitivan, do dediĉitan juron respektu la juristoj kiel natursciencan fakton. Ĉu tiu estas tasko de iu ĵurnalisto?

Sur paĝo 9 li skribas krome: "[...] la vera, malriĉa Sovetio - kun cenzuro, kun disidentoj en mensmalsanulejoj kaj kun longaj vicoj en la malplenaj manĝovendejoj [...]" Eble trafa pri-skribo pri Sovetunio; sed oni ne ĵetu ŝtonojn, sidante en vitra domo!

La cenzuro, ekzemple en Germanio, fakte ne estas ŝtata afero, sed ĝi ekzistas. Unuflanke la posedantoj de la gazetoj kaj sendostacioj influas la enhavojn de la eldonaĵoj el siaj entreprenoj, laŭ ekonomiaj konsideroj, aliflanke oportunistaj ĵurnalistoj agas laŭ propra cenzuro en siaj kapoj aŭ estas rekte agantoj de diversaj lobiistoj. Kelkaj civitanaj pro tio nomas tiun "Lügen-Presse" (mensogoj-gazetaro). - Laŭ mia scio ekzistas la sama trompado ankaŭ en aliaj Eŭropaj landoj.

Gustl MOLLATH eksciis de sia edzino, ke la Bavaria banko "Hypo-Vereinsbank" krime agis. Li informis la policon kaj la prokurorecon. Anstataŭ fari enketojn pri la supozitaj krimoj de la banko, oni arestis s-ron MOLLATH pro lia paranoja konduto. Eĉ kiam la banko - mallaŭte - konfesis, ke MOLLATH pravis, la Bavariaj kortumoj ne pretis suspendi la juĝon. Dum sep jarojn diversaj ekspertizistoj - sur-baze de la aktoj kaj sen personaj kontaktoj al MOLLATH -

konfirmis la diagnozon, ke li estus danĝero por li mem kaj lia ĉirkauaĵo. Respondecaj politikistoj silentis. Nur post raportoj en gazetoj la skandalo fariĝis konita ... kaj MOLLATH estis subtenita de pli kaj pli multaj homoj. Fine la plej alta kortumo kasaciis la juĝon. Kio estas la diferenco al Sovetunio?

Longajn vicojn oni trovas en Germanio kelkloke: en oficejoj, aparte tie, kie malriĉaj homoj devas atendi, antaŭ supkuirejoj, kie malsataj homoj petas pri nutraĵo, ĉe kuracistoj por senhejmuloj ktp. Ĉu ne ankaŭ en la aliaj landoj de Eŭropa Unio?

Jam en la unua ĉapitro de tiu libro tiom da ĉagrenaj lokoj. Damne!

Berlino, je la 22a de Julio 2015